Forts. från sista raden längst ner på sidan: Ja så ser förslaget ut. Det kan naturligtvis ändras. 5.000 ex. i första omgången. Låt sättningen stå kvar. Mycket tunt papper. c:a A 5. Men låt Åberg få veta det åtminstone i ett tel.samtal.

/ Strönne.

Almén. Du talade om en ny upplaga av Al mia korespondanto. Det är jag med på. Men för att undvika alla slags missförstånd och slitningar, så måste helt enkelt Åberg underrättas, innan pressarna sättas igång.

Str.

Jag tillåter mig här nedan göra ett textförslag.

Svedujo en 1949.

GRAVA LETERO

AL MIA KORESPONDANT(IN)O .

Unu el la plej gravaj rimedoj por nia laboro en la tuta mondo estas la radiodisaŭdigoj en esperanto. Tion komprenas ĉiuj gesamideanoj, kaj ili laboras por tiu celo en ĉiuj landoj. Sed en tiu grava laboro ni ĉiuj devas helpi unu la alian, kaj kun granda ĝojo oni notas, ke multaj esperantistoj en diversaj landoj ĉiutage sendas leterojn, kartojn kun dankoj, instigoj, proponoj ktp al radiostacioj, kiuj favoras nian lingvon.

Bedaŭrinde Svedujo ĝis nun ne havis la avantaĝon povi prezenti regulajn disaŭdigojn.

Sed nun! Ek de la nuna jaro la sveda radio regule disaŭdigos programojn en esperanto. Kaj la saman programon oni disaŭdigas 3-foje; ĉiusemajne

SVEDA RADIO (Stockholm) Tempo: MET(Meza Eŭropa Tempo)

LUNDE 08.15 - 08.30 49,46 metroj kaj 31,46 m,

LUNDE 16.15 - 16.30 19,80 m. kaj 27,83 m.

MARDE 02.15 - 02.30 49.46 m. kaj 31.46 m.

Do la saman programon. Elektu mem tiun tempon kaj tiun ondolongon, kiu por vi estas plej konvena.

La disaŭdigoj enhavas kronikojn pri aktualaj svedaj cirkonstancoj kaj parte novaĵoj pri la esperantomovado en Svedujo. La ĉefaranĝanto estas rektoro Karl Söderberg, Uppsala, Svedujo.

G R A V E !

H E L P U N I N !

Sendu, kiam vi aŭskultis iun programon (kaj mi esperas, ke vi tion ofte faros) leteron aŭ karton al la sveda radiostacio. Danku, proponu, instigu. Kaj skribu ĉiam en esperanto.

NENIAM MENCIU, ke vi ricevis tiun ĉi leteron. NENIAM SENDU tiun ĉi leteron al la radiostacio sveda. Uzu kiun ajn specon da papero aŭ karto.

ELEKTU inter la ĉisubaj proponoj la adreson. Ĉiuj estas egale bonaj, sed vi nepre variu, por ke la koncernuloj ne ĉiam trovu la saman adreson.

SVEDA RADIO , Stockholm, Svedujo
Sveriges Radio, Stockholm, Sverige
RADIO STOCKHOLM , Stockholm, Svedujo
RADIO-SERVO, Stockholm, Svedujo
RADIOSTACIO, STOCKHolm, Svedujo

Dankon por via helpo!
Samideane via